KOMUNIKOJ DE LA DIREKCIO

Sub tiu titolo ni respondos la demandojn, kiuj ne necesigas leteron. Kiu deziros privatan respondon, tiu bonvolu skribi per poŝtkarto kun parto por respondo pagata.

➤ S-o A. Barbot estas nur presisto kaj ne libristo. Tial oni sin turnu al li *nur* por l'abonoj. Ĉiuj ceteraj leteroj aŭ mendoj devas esti adresataj *rekte* al la Direktoro de E. K.

➤ **Ni petas la Direktoroj de Esperantaj gazetoj, ke ili ŝanĝu la malnovajn adresojn de E. K. kaj de ĝia Direktoro.**

UNIVERSALA INFORMADO (U. I.)

Anoncoj, komunikoj de U. I. estu sendataj, kun antaŭa pago, rekte al la Direktoro de la revuo.

Abonintoj de E. K. povas komuniki al ceteraj legantoj ĉion, kion ili volas, pagante por unu vorto kvin centimojn. Vorto da pli ol dek literoj kostos duoble, — vorto da pli ol dekkvin literoj kostos trioble; vorto da pli ol dudek literoj ne estos akceptata.

Loĝado en Franclando : ➤ JUNULO estus akceptata kiel lernanto aŭ loĝanto en la domo de la Direktoro de E. K. Modera pago.

Gazetoj : ➤ LE SOUVENIR, Monato Ĵurnalo literatura. — BELGUJO : 1 frank. — Unuiĝo poŝta: 1 fr. 50 — Direktoro-Fondatoro: XAVIER CASIER, Premiita de Akademio Reĝa de Bel-Artoj, membro de komitato de « Unuiĝo de perioda Gazetistaro ».

➤ LE GLANEUR, Literatura, scienca, muzika kaj bibliografia. — Revuo monata. — Abonkosto : Belgujo : 2 fr. — Ekster Belg. 3 fr. — Administracio, redakcio kaj anoncoj : 406, rue Vanderkindere, Uccles (Bruxelles).

➤ GUIDA CARTOFILA ITALIANA, belega rev., interesega por kolektist. de poŝtk, de « ex-libris » kaj markoj datmemorigaj. Direkt. Grafo D. Cumbo, via S. Maria la Porta, 9. Messina. Abon., kun rajto por unu enpreso de koresp. 3 fr. en Itall. 4 fr. ekstere.

Korespondado : ➤ S-INO JANE PARIS, Les Hommeaux, Lion d'Angers, (M.-et-L.), dezir. korespondadi per ilustrit. poŝkartoj aŭ leter. kun ĉiuland. Esperantist.

Kolektistoj : ➤ S-o VARJU Endre, Budapest IV, Kygio U. 6. 2. em. 14 kolektas k. interŝanĝas uzitajn poŝtm.

➤ ESPERANTA-KARTOFILATELA KLUBO (E.K.K.), sola klubo kartof. esperant. Jara kotizajo : 2 fr. 50. Ĉiu aliĝanto ricevos la revuon: Le Carto-Philatélique Journal, oficiala organo de l'klubo. Direkcio 91, rue de Dunkerque, Paris.

➤ **Fotografajoj.** — S-o Jakobo Meazzini (vidu adreson en la nomaro de la Rajtigitoj) skribas al ni « En la venonta somero mi deziras presigi artikolon en la itala monata gazeto *Varietas*, kun la

ĉefaj ilustraĵoj de eminentuloj esperantistaj. Tial mi petas samideanojn, ke ili bonvolu sendi, por tiu dato, kelkajn belajn fotografaĵojn. »

➤ « **La Nova Rassegna** », monata revuo, eniras ĝian trian jaron. Ĝi ĉiam pli dikiĝas kaj aperas ĉiumonate pli interesa ne nur al italoj, sed plie al eksteritaloj. Estas tre gravaj la verkoj pri *Serbo-Kroata literaturo*. Krom tio ĝi publikigas artikolojn lituraturajn, artajn, kritikajn studojn, sciigojn historiajn, paĝojn de fremdaj literaturoj, k. c. kune kun bibliografio de novaj libroj. Kostas nur 6 fr. jare. La gazetoj esperantistaj bone faros ekŝanĝadi tiun revuon, kiu anoncos ilin. Direkcio kaj Administrac. : Via Ricasoli, 61 63, Firenze, (Itall.).

➤ **Tradukataj verkoj presotaj.** — « KRISTNASKA SONORADO » (Christmas Carol) de Charles Dickens, estas tradukata de nia amiko D-ro Martyn Westcott. — *Imitado de Jesuo Kristo*, esperantigita de A. Damevido, presiĝos kiam subskribantoj estos sufiĉe multaj.

Londono : ➤ PENSIO por gesinjoroj. Hejmaj konfortaĵoj, bano (varma kaj malvarma). Moderaj prezoj. Oni parolas kaj korespondas

Sekvo p. V.

Societo Espero Katolika

CELO Disvastigi Esperanton en la mondo katolika; produkti, traduki, dissemadi katolikajn verkojn; organizi klubojn, kunvenojn, kursojn pri Esperanto, en la katolikaro.

KONDIĈOJ : Esti katolika; pagi jaran kotizaĵon minimume da 1 franko. (Ĉiu donacinta 100 fr. estos « Bonfaranto »).

SOCIETANOJ : Aprobantoj, Adeptoj, Fervoruloj, Elektistoj.

FAVOROJ SPECIALAJ AL ĈIUJ SOCIETANOJ : ili ĝuos rabaton da 0 fr. 50 por aboni la Revuon, rabaton da 0 fr. 20 *por cent.*, por presigi komunikojn en *Universala Informado* ; rabaton da 0 fr. 50 por aboni *Oficejon de libraj informoj*.

KLUBOJ : Kiam estas almenaŭ *ses* anoj de S. E. K. en ia urbo, ili povas kuniĝi, elekti komitaton kaj peti aprobon de la Direktoro de S. E. K. Kluboj tre utilos : 1e por helpi klubanojn en akirado perfekta de la lingvo Esp. ; 2e por krei rilatojn inter diversnaciaj Kluboj aŭ Esperantistoj katolikaj ; 3e por kunlabori internacie pri socialaj, religiaj, literaturaj, artaj, komercaj aferoj, k. c. Por faciligi tiajn rilatojn tre gravas, ke ĉiu Societano konigu sian specialaĵon aŭ profesion. Ni do proponas krei jenajn Fakojn en S. E. K. I, Religio. II, Socialaj studoj. III, Literaturo. IV, Artoj. V, Komerco kaj Industrio. Aliaj Fakoj formiĝos laŭbezone. Ni do petegas tiujn, kiuj sendos aliĝon al S. E. K., klarigi samtempe en kia Fako ili deziras enskribiĝi. *Ni senpage publikigos unufoje plenan adreson kaj specialaĵon de la Societanoj.*

TRE GRAVAS POR NIA ENTREPRENO, KE ĈIUJ KATOLIKAJ ABONANTOJ DE E. K. ENSKRIBU SIN EN S. E. K.

IVa Jaro 1905-06 JANUARO No 24

ESPERO KATOLIKA

REVUO MONATA EN ESPERANTO

« Unum ovile et unus pastor ». — (*Johan X. 16*).
« Unu ŝafaro kaj unu paŝtanto »

Direktoro P-o Em. PELTIER — (PELTJE)
à Sainte-Radegonde près Tours (Indre-et-Loire) France

Abono jara : En Franclando : 2 frankoj. Ekster — 2 fr. 50. | **Unu numero :** 0 fr. 30, afrankite.

Abonoj estas akceptataj nur por tuta jaro. Komencaj datoj: oktobro, januaro aŭ marto. La Revuo ne aperas en augusto nek en septembro.

Anoncoj. — Tuta paĝo kostos 15 frankojn ; — duona paĝo 7 fr. 50 ; — 4na paĝo : 4 fr. ; 8na paĝo 2 fr. 50 ; 16na paĝo : 2 fr.

Por anoncoj ripetitaj, rabatoj por tri fojoj 10 °/₀ ; — ses fojoj : 15 °/₀ ; — por 12 fojoj 20 °/₀

Manuskriptoj kaj leteroj pri E. K. estu sendataj nur al la Direktoro. — Manuskriptoj neniam estos resendataj.

ANGLOLANDO : S-o O'Connor, 17, St-Stephen's Square, Bayswater, LONDON.
BELGLANDO : S-o P. Mattelaer, 3, Place de l'Université, LOUVAIN.
ĈILILANDO S-o Luis E. Sepulveda Cuadra, Casilla 1679. SANTIAGO-CHILI.
HUNGARLANDO S-o Endre Varjufalvy Varju, IV, Kigyo, U. 6, 2. em. 14 BUDAPESTO. —
ITALLANDO : S-o J. Meazzini, presso Franco Lucani, piazza G. Monaco 18, AREZZO.
HISPANLANDO S-o Ant Guinart, Escuelas Pias VALENCIA.
RUSLANDO Societo Espero Bol. Podjaĉeskaja, 24, log. 12.
MEKSIKLANDO S-o Fernando Blanco, Pastro de Santa Rosa, NECOXTLA, (Estado de Veracruz).
BRAZILLANDO S-o José Felippe d'A. Coutinho, en PATY. E. F. C. B. (Rio de Janeiro).
BULGARLANDO : S-o G. Oreŝkov, en PLOVDIV.
Niaj Rajtigitoj povas varbi abonantojn kaj ricevi l'abonmonon.



PRESEJO A. BARBOT
15, Rue Etienne-Pallu, 15
TOURS. (TUR') FRANCE

PUBLIKA LETERO AL CIUJ PASTROJ KRISTANAJ

Katolikaj, protestantaj, rusortodoksaj, grekaj, armenaj, k., c.

KARAJ FRATOJ EN KRISTO,

En la neforgesebla Kongreso de Boulogne, mi deziris, en toasto, la unuiĝon de la diversreligianoj per Esperanto. La deziroj estas vanaj, se ili ne eksteriĝas en realecon per agoj. Hodiaŭ mi proponas al vi ekrealiĝon de tiu deziro, entuziasme akceptita kaj aplaŭdita de la ĉeestintaj kongresanoj en Boulogne.

Ŝajnas al mi, ke la unua paŝo farinda estas la reunuiĝo de la *kristanaj* religioj. Multaj kredoj, preĝoj, esperoj, estas komunaj al ĉiuj *kristanoj*. Nur malmultaj punktoj estis, en estinto jam malproksimega, kaŭzoj de malunuiĝo inter ili.

Ĉu vi ne pensas, ke nun alvenis tempo, kiam oni povas paceme, unuiĝeme kaj frate, kun animo tute senigita de l'tiamaj pasioj, ekzameni tiujn malnovajn malkonsentojn ?

Ĉu ne io mirinda, bedaŭrinda, malaperinda, ke diskiploj de tiu, kiu ordonis : « amu vin reciproke », daŭrigas sin reciproke malami pro malpacoj alvenintaj antaŭ kelkaj jarcentoj ! Ni ĉiuj deziras alvenon de Krista regno ; ni ĉiuj laboradas por morala progresado de l'homidaro ; ni ĉiuj estas pretaj oferi niajn tutajn fortojn, nian tutan vivon, por tiuj noblaj celoj. Kial do ni pli longe restus malunuigitaj, ĉiuj aparte laborantaj, rifuzante koni kaj helpadi la laborojn de l'aliaj ?

Mi hodiaŭ, kun sincereco plej vera, kun koro esper-kaj amoplena, faras unuan paŝon por iri renkonte al vi, por al vi proponi interparoladon amikan pri niaj sanktaj priokupoj.

Vi amike min akceptos, ĉu ne ? kaj nia unuiĝo estos ja la plej glora kaj fruktodona venko de Esperanto !

Unue devas unuiĝi la Esperantistaj *pastroj* kristanaj, por kune studadi la demandon kaj difini la rimedojn uzindajn por atingi la celon. Mi esperas, ke la pastroj el ĉiuj kristanaj religioj respondos mian alvokon, sendante al mi sian nomon kaj aliĝon al l'ideo de unuiĝo.

Eĉ se ni estos nur deko, nur trio..., mi promesas, ke mi de nun neniam forlasos tiun grandan celon.

Kiam la unuiĝemaj pastroj sin konos reciproke, per publikigo en E.K. de la aniĝantaro, ni pensos pri la dua paŝo farota.

Mi atendas vin, fratoj...

EM. PELTIER. *Dir. de E. K.*

P.-S. — Mi esperas, ke la gazetoj esperantistaj bone volos presigi tiun ĉi avizeton : « Pastroj el ĉiuj religioj estas petataj atente legi la n-on 24-an de *Espero Katolika*. »

LA PLIGRANDIGO DE E. K.

La voĉdonado pri lapligrandigo de E. K. ŝajnas montri, ke la abonantoj deziras revuon pli dikan kaj pli gravan, kaj ke ili estas pretaj pagi abongon da 4 fr. — Tamen la voĉdonoj estas ankoraŭ *tro malmultaj* por ke mi estu sufiĉe « lumigita » pri la opinio de l'abonantaro. Mi insiste petas, ke la legantoj de E. K. *kiel eble, plej rapide* konigu sian deziron. Simpla vizitkarto, kun vortoj : *Por egiĝo*, aŭ *Kontraŭ egiĝo*, sufiĉas, en koverto *malfermita*, kun afranko da 5 centimoj.

ARTO KAJ MORALO

De S° D. Mercier [1]

(Tiu artikolo rilatas al la internacia ekspozicio de Liège (Belgujo, 1905), en kies ĝardeno estis elmetita skulptaĵo tute ne honesta).

La verko arta sin turnas al l'animo tuta. Pentraĵo, skulptaĵo, muzikaĵo, kiuj « diras nenion al l'animo », tragedio, dramo, kiuj « ne vin kortuŝas », romano, kiu vin lasas « indiferenta », estas verkoj malsukcesaj. Artisto vera estas tiu, kiu scias elpensi idealon pli belan, ol la realeco observita; tiun idealon longatempe li konsideris, karesis, amis, kaj li ĝojas vidi ĝin en sia fantazio, kaj poste ĝin retrovi, kvankam nesufiĉe realigita, en la verko, kiun li penegante efektivigis. Eĉ se li estus sola por kompreni kaj ĝui tiun verkon, li havus kompensaĵon por siaj penadoj, ĉar li amas sian arton, li vivas por ĝi.

Kiam li elmetas sian verkon antaŭ la granda publiko, kion volas la artisto ?

Ĝin « rigardigi kun komplezo, ĝin admirigi » du esprimoj de sama ideo. La impresojn, kiujn li ĝuis, li volus pasigi en l'animon de siaj admirantoj. Li ne petas vin rigardi tra lento kaj priskribi ĉiun detaleton de siaj personaĵoj ; nek kun cirkelo preni la mezuron de iliaj ampleksoj ; nek per fotografilo fiksi sur senviva kliŝaĵo tiun grupon kiu *parolas*.

Li invitas vin, samideiĝi kun li, vin meti je sia vidpunkto, por kompreni sian ideon, partopreni sian senton, vibrigi en vi la impresojn, kiuj lin inspiris. Ia filozofo de la mezcentjaroj diris : La beleco altiras, ĝi amigas sin, *pulchrum trahit ad se desiderium*.

Verko nur tiam estas arta verko, kiam ĝi estas bela, — tio ĉi estas « truismo », kaj ĝi estas bela nur tiam, kiam ĝi estas kapabla « impresi », « ĉarmi » tiun, kiu ĝin komprenas.

Esti « sub la ĉarmo » ne signifas koni malvarme tion, kio estas, kiel geometriisto konas siajn teoremojn, kaj kemiisto siajn formulojn ; ĝi signifas rigardadi, avide konsideri, deziri, ami.

Tiu, kiun ĉefverko lasas indiferenta, estas « filisteno », « burĝo ».

Nu do mi demandas la artiston kaj la artkritikiston Ĉu estas

---

1. Publigita en « Le Patriote », el Brusel'.

indiferente al honesta konscienco senti ĉarmon, — ĉu estas indiferente al vi, artisto, sentigi ĉarmon per vidaĵo voluptiga al tiuj, kiuj rigardas vian verkon? La homo besta facile impresiĝas pro logaĵo sentama, voluptiga; la homo prudenta impresiĝas jen pro logaĵo de bono honesta, jen pro ĝuo kiu, kvankam ne pozitive morala, estas tamen neriproĉinda, do rajta; ĉu estas al vi indiferente senbridigi la homon bestan, aŭ plivole bridigi siajn instinktojn malbonajn, por helpi lin supreniri kun vi al la konsidero kaj ĝuo de la bono honesta?

***

La scienculo serĉas koni tion, kio estas. Li turnas sin al la inteligento sola, por montri al ĝi la aferojn tiel, kiel ili estas.

La artisto efektivigas verkon, kiu estas esprimo ĉiam neperfekta de idealo karesita kaj amita. Li turnas sin al l'animo tuta; se li parolas al la inteligento, ĝi estas por tiamaniere tuŝi la koron; lia celo, lia espero estas rigardigi kompleze la frukton de lia elpenso.

Estas malpermesita al homo honesta — artisto aŭ burĝo — elĝoji pri la konsidero de gesto, sintenado, parolo, kiuj esprimas, dezirigas kaj amigas faron malbonmoran.

Scienco ne atentas pri la moralo.

Arto, kontraŭe, pro sia naturo, rilatas senpere al la moralo: ĝiaj verkoj estas nepre submetitaj al la leĝoj de l'honesteco.

Esperantigis la sepdekjara E. J. WEEMAES.
(El Loven. Belgujo)

REVUO DE L'ESPERANTISTAJ REVUOJ

LINGVO INTERNACIA (dec. 1-a). — En « La vojaĝoj de Uliso », S-o Lambert montras, ke Homero tute ne akurate priskribis la lokojn. » Tre interesa literatura artikolo. — « En unua tago de libereco », de Leo Belmont. Priskribas la entuziasmon de la Varsovianoj, kaj rakontas teruran epizodon, kiu okazis dum la popola elmontro en stratoj. — « Pri proponita enkonduko de du novaj prepozicioj. » Samideano, en antaŭa artikolo, miris, « ke jam de dek aŭ dudek jaroj, la plej bonaj verkistoj de Esperanto ne sentis la mankon de du prepozicioj, por traduki pli precize la du sencojn de la prepozicio *de*. Oni respondas, « ke ŝajna dusenceco devenas de malbonuzo, kaj de laŭvorta (ne laŭ-idea) traduko de nacilingvaj prepozicioj. » Fine, oni konkludas, ke ni tute ne bezonas novajn prepoziciojn. — Tre saĝa.

ESPERO PACIFISTA (okt.-nov.). — Pri internacia Federacio de nacioj, pritraktota en Dua Konferanco Haga « Tre rekomendinda al la atento de niaj legantoj estas, aliflanke, la difino de la federacio per la limigo de la libereco kaj suvereneco de la nacioj, same kiel, en ia nacio, la libereco de ĉia regnano estas limigita de la libereco de liaj kunregnanoj. Estas necese ke oni kutimiĝu kun la detaloj de tiu ideo de federacio, kiu estas propradire la ĉefideo de la movado pacifisma.

lam, kiam nia partio estis ankoraŭ sen nomo, mi proponis, ke oni nomu nin *Federalistoj*. Oni tiam timis, ke tiu nomo estu malbone komprenata, kiel la nomo *Internaciistoj* : kaj malmute poste, Arnaud elpensis kaj oni alprenis la nomon *Pacifistoj*.

« Sed post tiu tempo, la ideo de federacio faris grandajn progresojn ; ĝi komencas nun esti ĝenerale komprenata, — la vortoj « Unuigitaj Ŝtatoj de Eŭropo » ne ŝajnas plu ridindaj — kaj la federacio estas la laŭte konfesata celo de niaj penoj.

« Ne nur oni ne ridas plu, aŭdante la esprimon *Unuigitaj Ŝtatoj de Eŭropo*, sed oni trovas ĝin nesufiĉa : oni petas Unuigitajn Ŝtatojn de Eŭropo kaj Ameriko (Ameropo), kaj eĉ U. Ŝ. de l'Mondo ! ». — La katolikoj devas atente sekvi kaj helpi tiun gravan movadon al unuiĝo de l'nacioj ĝi estas plej konforma al la katolika dogmaro kaj al la instruado de Jesu-Kristo.

TRA LA MONDO (dec.). — Inter aliaj interesaĵoj, komencas « Enketon internacian pri la vivado en la edukejoj ». — Profesoro Bord lerte priskribas la « Mondfaman Fabrikejon » *Le Creusot'* (Francujo) « Ni eniru en tiun imperion de *Fero*, kie regas la reĝa moŝto, *Fajro*. Jen estas la putoj profundaj je 300-400 metroj, kiuj produktas pli ol 100 000 tunojn da terkarbo, (apenaŭ la kvinona parto de la konsumo Jen estas la kvin altfornegoj, inter kiuj la lasta (1898), funkciadinte de la kvina horo vespere ĝis la morgaŭa tagmezo, fluigis 17. 000 kilogramojn da ferfandaĵo. Intersekve ni trapasas le laborejojn de ŝtalaj, kupraj konstruaĵoj por lokomotivoj, ŝipkaldronegoj, tuboj, pontoj, k. t. p., kaj la artilerian laborejon, kie montriĝas pafilegoj divers-formaj, divers-longaj kaj kuglegoj brilaj, nikelaj, kiuj similas al strangaj cigaroj aŭ cigaringoj. »

SCIENCA REVUO (dec.). — Precipaj artikoloj La atmosferoj de Neptuno kaj Uranuso (Em. Touchet). — Pri unu provo de marista terminaro (Rollet de l'Isle). — Fragmentoj el « Mirindaĵoj de l'vivo » de Hackel (Kabanov). — Spiritismo antaŭ scienco (D-ro Grasset). Plej interesa studo psikologia, kiu tre klarigas multajn demandojn psikajn.

INTERNACIA REVUO MEDICINA (jan.). — Nova gazeto, 400 paĝ. jare, granda formato, kiel *Scienca Revuo*. Administracio, 33, rue Lacépède. Paris. « La celo de la eldonantoj estas fari praktikan, internacian revuon medicinan, utilan samtempe por la kuracistaro kaj por Esperanto. La gazeto estas kunlabore redaktata kaj eldonata. El la grandega amaso de la diverslanda literaturo medicina, ĝi ĉiumonate ĉerpos tion, kio estas utila, serioza, vere taŭga por informi la legantojn pri la disvolviĝado de la medicinaj nuntempaj aferoj kaj opinioj. Kune kun resumo de la plej interesantaj laboroj publikigitaj dum la monato, estos enpresataj praktikaj revidoj aŭ lecionoj, sciigoj pri la disvastiĝo de Esperanto inter kuracistoj, pri la agado de medicinistaj grupoj Esperantistaj, ktp. — La enhavo estos diverslingva angla

franca, germana, hispana, k.a., kun apuda traduko en Esperanto ». — Koran bonvenon al nia nova kunfrato.

JUNA ESPERANTISTO (dec.). — La Gers'a Lako (de Topffer) traduko de Ed. Pr Ni tre konsilas tiun revuon al la Esperantistoj, kiuj volas instrui siajn infanojn pri Esperanto.

UNUA PAŜO. — Nova gazeto tute en Esperanto (S-o Petkov, 26. strato San Stefano, Sofia, Bulgarujo). Anoncas la reviviĝon de Bulgara-Esperanta gazeto.

NOTETOJ

ANALOJ DE FILOZOFIO KRISTANA (nov.).-En nia 20-a n-o ni anoncis, ke la Direktoro estas nun la tre klera Pastro Laberthonnière. Tiu grava revuo (100-paĝa monate) daŭrigas publikigi interŝanĝe anoncon por E. K. Estas dezirinde, ke multaj filozofoj Esperantistaj skribu al la Direktoro *en Esperanto*, por peti ke la raportoj pri novaj libroj estu eldonataj samtampe Esperante kaj france, ĉar la revuo vendiĝas en Bruxelles (Librejo Schepens), Romo (Bocca), Firenzo, (Loescher), Milan (Dumolard), Genoa (Beuf), Berlino, Vien, Leipzig Budapest (Lesoudier kaj Brockhaus), Friburgo-en Brisgaŭ (Herder) Londono (Dulau), Krakovio (Moravski kaj Gebethner), Varsovio (Orgelbrand), Graz (Moser), Nov-Jorko (Stechert), Quebec (Demers).- Pripensu tion, karaj legantoj, kaj agadu...

PAROLO DE PAPO PIO X-a

(El grava ĵurnalo : *L'Echo de Paris*)

Papo Pio X-a aprobas, ke Italujo defendu, en la Algesiras'a Konferenco, la kaŭzon de l'Izraelidoj kaj de libereco religia. Memorigante siajn protestojn kontraŭ la mortigadoj en Ruslando, li diris « LA HOMARO ESTAS NUR UNU FAMILIO DE FRATOJ ». — Tiu parolo estas por ni, Esperantistoj katolikaj, tre kuraĝiga. Ni povas tutkore laboradi por la universala frateco : ni tial ekrealigos deziron de nia Sankta Patro.

MONOFEROJ POR ESPERO KATOLIKA

TRIA NOMARO F-ino Lagoguey (Paris) 5 fr. — S-ino Brézet (Paris) 5 fr. — S-oj Champion (Chaumont) 3 fr. — Louis Jorrand (Aubusson 1 fr. — Wicard (Roubaix) 8 fr. — Pastro A. Dombrowski (S. Peterburgo) 40 fr. — E. Lefèvre (Le Bouchet) 8 fr. — « Joĉjo », 5 fr. — Jean Cyrot (Beaune) 3 fr. — Anonimo 2 fr. — Sumo. — 80 fr.

Antaŭaj donacoj : 313 fr. 50 + 80 fr. = 393 fr. 50.

Restanta ŝuldo 700 fr. — 393,50 = 306 fr. 50.

Al ĉiuj donacintoj plej sinceran dankon. Espereble la bedaŭrinda ŝuldo baldaŭ tute malaperos..., kaj E. K., poste, povos fari grandan paŝon antaŭen !

EM. P.

BIBLIOGRAFIO

ROLANDKANTO Tradukis Doktoro Noël. Belega 170-paĝa volumo en versoj, (Afrankite 1 fr. 70). Lerta kaj tre poezia traduko de franca malnova epopeo *La Chanson de Rolaud*, 4.000 (kvar miloj !) da versoj !

SEP RAKONTOJ, originale verkitaj en la lingvo Esp., de Ivan Malfeliĉulo ; 73-paĝa. Afrankite, nur 1 fr. 10. « Pentras per sperta plumo la karakteron apartan de l'popolo rusa. »

RUĜA FLORO de V Garŝin ; traduko de K. Boguŝeviĉ. 23-paĝa. Afrankite 30 centimojn. Stranga kaj interesa rakonto pri frenezulo

PERDITA KAJ RETROVITA, originala rakonto de Em. Boirac, Rektoro de la Diĵona Universitato. 23-paĝa. Afrankite 65 centimojn. Jen la tuta antaŭparolo : « Infanoj miaj, aŭskultu tre malnovan fabelon, kiun al mi rakontis iam mia patrino dum sendorma vespero. »

NOTO. — La supre anoncitaj presaĵoj estas eldonitaj de Presa Esperantista Societo,

PAŬLO KAJ VIRGINIO, de Bernardin de Saint-Pierre. Trad. H. Hodler. 115-paĝa. Afrankite. 1 fr. 45. Estis publikigita kiel Literatura Aldono de L. I.

ESPERANTO NOTIONS ELEMENTAIRES ET EXERCICES DE CONVERSATION de Th. Cart, du kajeroj, po 20 centimoj afrankite ; kune 30 centimojn.

REABONOJ

Ni tre dankas, niajn abonantojn, kiuj afable jam sendis al ni sian abonpagon. — Se vi ne ankoraŭ pagis, bone Volu, kara leganto, ne atendi pli longe. — Fine de januaro, ni sendos poŝtan kvitancon al la nepagintoj, hun plipago da 50 centimoj. — En landoj, kie estas Rajtigito de E. K., vi estas petataj pagi al la Rajtigito. — N-B. — Se vi ofte estas *malhejme*, bone volu doni ordonojn, por ke oni akceptu la kvitancon poŝtau.

NIGRO 5 pecoj.



BLANKO 6 PECOJ

PROBLEMO 3-a

de S-ino Baird

Blanko komencas, kaj mortigas per la 2-a iro.

Sendu solvojn al la Direktoro de E. K.

—:—

Pro manko da loko, ni povas ne nun doni nur problemon.

Presejo A. BARBOT, Tours. *Le Directeur-Gérant :* EM. PELTIER

KUN SES BELAJ ILUSTRAJOJ,
KATO KUN BOTOJ.

Kosto 0 fr. 50, afrankite. Aĉetebla ĉe la Direktoro de E. K.
Specialaj kondiĉoj por almenaŭ *dek* ekzempleroj kune mendataj.
Baldaŭ aperos n-o 2 a : Cindrulino, kun 6 ilustraĵoj; sama prezo.

LINGVO INTERNACIA
ESTAS NUN DUONMONATA
Enhavas 24 paĝojn. Sen literatura aldono 5 fr. — kun literatura aldono : 7 fr. 50. Adreso nova : Presejo Esperantista, 33, rue Lacépède. Paris, 5e.

LE SOUVENIR, Monato Ĵurnalo literatura. — Belgujo 1 frank. — Unuiĝo poŝta 1 fr. 50 — Direktoro- Fondatoro Xavier CASIER, Premiita de Akademio Reĝa de Bel-Artoj, membro de komitato de « Unuiĝo de perioda Gazetistaro ».

KOLEKTISTOJ S-o, Varju Endre, Budapest, IV, kygio U- E. 62. em, 14, kolektas k. interŝang. uzitajn poŝtm.

LONDONO ; Pensio por gesinjoroj. Moderaj prezoj. Oni parolas k. korespondas Esperante, Angle kaj France. — S-ino O'Connor, Esperanto House ; 17, St-Stephen's Square ; London-Bayswater.

HO, MIA KOR Kanto Esperantista. Poezio de D-ro Zamenhof. Musiko de S-ino Josée GUIVY. — Plej ŝatinda muzikaĵo, kantita en Boulogne, dum la Kongreso. Aĉetebla ĉe la Presa Esperantista Societo, kaj ĉe la Direktoro de E. K. — Prezo 1 fr.

ESPERO PACIFISTA, MONATA ORGANO DE LA SOCIETO POR LA PACO, abono 5 fr. kun aliĝo al la Societo kaj ricevo de la aldonoj.
S-ro Gaston Moch, 26, rue de Chartres, Neuilly-sur-Seine (Francujo).

ANNALES DE PHILOSOPHIE CHRÉTIENNE (*Analoj de Filozofio Kristana*). — Direktoro : Pastro Laberthonnières. Administracio : Librejo Bloud, 4, rue Madame, Paris, abono jara : 20 fr. — 100-paĝo monate. — La plej internacia, plej serioza, plej progresema revuo filozofia !

Esperante, Angle kaj France. Sinjorino O'CONNOR. Esperanto House. St. Stephen's Sq^r, Bayswater, 17.

➤ ESPERANTA LIGILO, revuo por Blind., eliros en 1905 ĉiudumonate (6 numer. jare). Abono : 3 fr. Oficejo : 12, rue Soufflot, Paris. Direktoro : S-o Th. Cart. Oni abonas ankaŭ ĉe nia « Oficejo de Libraj Informoj ». — La 4 n-oj de jaro 1904 estas nune aĉeteblaj.

Vojaĝoj : ➤ S-o CASIER, 83, boulevard Anspach. 83, Bruxelles (Bourse). — Téléphone 45-50. — Biletoj rektaj aŭ rondiraj kun rabato. — Ekskursoj sen aŭ kun konduktoro kosto laŭ reciproka konsento. — Speciala kaj agrabla sistemo por edziĝaj aŭ familiaj vojaĝoj.

GAZETOJ RICEVITAJ

REVUE DU CLERGE FRANÇAIS (Revuo de Franca Pastraro). 1-a de aprilo. Precipaj artikoloj La deveno de la nunaj sukcesoj de Japanujo (F. A. Ligneul, Estro de Seminario de Tokio). — La kono de la personeco (V Bernies, Prof. de L'Instituto Katolika Pariza). Sociala Movado (Ch. Calippe). — Konsiliĝoj kaj informoj (A. Boudinhon). — Tribuno libera kaj dokumentoj.

ANNALES DE PHILOSOPHIE CHRETIENNE (Analoj de Filozofio Kristana) Marto. Katolika mistikeco kaj l'animo de Dante(A. Leclère, sekvo). — Evoluado de l'ideo de Libereco (Pastro A. Mesure)l eginda artikolo, kiu emas pruvi ke *Libereco* kaj *Eklezio* ne estas du malamikoj aŭ kontraŭuloj. — La neerarebleco Biblia kaj la Psikologio (F. Girerd). — La problemo Eŭkaristia (G. Koch). — La « Logos'o » ĉe Tatien'o; Atenagoro kaj Teofilo (J Leblanc — La scienca moralo laŭ S-o A. Bayet (Ch. Denis). — Korespondado. — Variaj kritikaĵoj pri novaj libroj.

COIN DE TERRE ET FOYER (Terpeco kaj Hejmo). Marta. — Ĝardenoj por Laboristoj kaj l'Episkoparo. — Malgrandaj fontoj de riĉeco kokinejo kaj ĝardenoj por laboristoj. — Bona ekzemplo en Annecy. — Novaj ĝardenoj. — Kroniko de la ĝardenoj. — Diversaĵo: LA VIVO, de Pastro F. KLEIN (Ekstrakto de la bela libro *Au pays de la vie intense,* — En la lando de la ega vivo).

ANNALES DE N-D. DU LAUS (Analoj de N. S-ino de Laŭs). Aprilo. Dekkvina datreveno de la kronado de N. S-ino de L. — Opinio de Kardinalo Lavigerie pri la Franca Konkordato. K. c.

BULLETIN DE LA CANADIENNE (bolteno de la Kanada Societo). Marto. — Ĝenerala kunveno. — Kanadlando kaj la komerca kongreso Pariza (M. Hodent). — Koloniigo informoj kaj novaĵoj (J. Bonhomme). — Kion diras la koloniistoj. Bibliografio : *La riĉeco de Kanadlando*, de E. Buron. — *Katolikismo en Unuigitaj ŝtatoj de Nord-Ameriko*, de M. André, Estro de l'Seminario Universitata Lion'a.

LA REVUE DE L'ESPERANTO (Revuo de Esperanto) semajna, de Boulogne, 23-an de Marto. Enhavas interesajn novaĵojn pri la aliĝoj fremdulaj al la Kongreso, inter kiuj troviĝas la aliĝo de niaj kanadaj amikoj, S-oj Beauchemin kaj Saint-Martin.

BLANKA DRINKAĴO KONTRAUMIKROBA

de Pastro A. MAGNAT, parohestro de Ancône.
Preparata de J. BRÉMOND, Farmacisto 1-aklasa en Marseille
Sanigas kun surpriziga rapideco, post kelkaj horoj
Influenzon, gripon, kokluŝon.
Variolon, morbilon, skarlatinon.
Tifan febron, erisipelon.

Plene sukcesas kontraŭ

haŭtajn malsanojn : ekzemon, likenojn, k. c. Sin turni al S-o François Villemeyre, Esperantisto, rue des Mirepoises, FIGEAC (Lot) Francl.

OFICEJO DE LIBRAJ INFORMOJ

(O. L. I.)

Celo : 1e liveri informojn pri francaj kaj Esperantaj libroj aŭ gazetoj; 2e ricevi kaj plenumi mendojn pri libroj aŭ gazetoj.

Utilo Ĉiulandaj Esperantistoj povos per O. L. I. aĉeti librojn francajn aŭ esperantajn, aboni la gazetojn, kaj, antaŭ ol aĉeti libron, peti informojn pri ĝia kosto, enhavo, valoro. — Kiam ni havos Korespondantojn en ceteraj landoj, O. L. I. liveros informojn pri verkoj el kia ajn lando. Ni baldaŭ konigos landojn en kiuj ni havos Korespondantojn. *Ĉiu Esperantisto eĉ ne aboninto de E K. povas uzi O. L. I.*

Abono : Ĉar O. L. I. necesigos specialan Sekretarion kaj multe da klopodoj por kolekti utilajn informojn, ni estas devigataj postuli sumon da *5 frankoj* por abono jara. El tiu sumo 3 fr. pagos l'abonon, kaj 2 fr. pagos la elspezojn de korespondado. — Abonoj etsas akceptataj en kia ajn epoko, sed nur por unu jaro.

Neabonantoj povas uzi O. L. I. pagante 0 fr. 50 por ĉia mendo aŭ peto de informoj.

Ĉiu abono aŭ mendo estas antaŭe pagota. — Poŝtmarkoj (escepte francaj) ne estas akceptataj kiel pago.

Funkciado : Oni respondos plej rapide, kiel eble, al ĉiu mendo aŭ peto de informoj. Kiel eble la respondo fariĝos per poŝtkarto, — escepte se l'aboninto postulos leteron. Kiam estos konsumitaj la 2 frankoj provizitaj por la elspezoj de respondado, avizo estos sendata al l'aboninto kun la lasta respondo. Li tiam devos denove sendi 2 fr., se li deziros adi mendojn. — Se fine de l'jarabono restos ia sumeto, ĝi estos enkalkulata kaj forprenata de sekvanta abonpago. Se oni ne reabonos, la sumeto ne estos resendata, sed oni povos ĝin uzi por apartaj mendoj po 0 fr. 50, *dum unu monato post le fino de l'abono.*